Nikolaus Lenau,

Vintronokto

tradukita de Manfred Retzlaff

Malvarmo regas kaj glaci'.
Vaporas mia spiro, kiam
Tra l' neĝo krake paŝas mi;
Antaŭen, nur antaŭen ĉiam!

Silentas en soleno ĉio!
Prilumas Lun' piceojn jenajn,
Klinantajn en melankoli'
La branĉojn mort-sopiro-plenajn.

Frost! ĝis la kor' penetru vi,
Ĝis varma kaj sovaĝa mia! 3)
Ke iam estu pac' en ĝi,
samkiel en arbaro tia!

Traduko de la Germana poemo "Winternacht" de Nikolaus Lenau *(∗1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2003-02-19.*

MR-396-1 / Arg-631-1274 (2012-10-26 15:14:44)

Vidu ankaŭ: `http://de.wikisource.org/wiki/Winternacht_(Nikolaus_Lenau)`.